

August Graf von Platen-Hallermünde,
Malofte viaj pensoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Malofte viaj pensoj
okupas sin pri mi;
diversas niaj mensoj,
diverson celas ni.²

Mi volus tramigradi
kun vi tra via land',
sub tendoj tranoktadi
kun vi ĉe fora strand'.

Se volas rekompenci
per am' vi tion ĉi
poemon, diferenci
ja ĉesos ambaŭ ni.

*Traduko de la Germana poemo "Du denkst an mich so selten" de AUGUST GRAF VON PLATEN-HALLERMÜNDE (*1796 – †1835) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1993.*

MR-260-1a / Arg-62-121 (2003-10-26 00:50:00)

²aŭ: alion celas vi.